

Heinrich Heine,  
Lurleia

*tradukita de N. N. 01*

Heinrich Heine,  
Lorelej'

*tradukita de Leopold Elb*

Heinrich Heine,  
Lorelejo

*tradukita de Joachim Gießner*

*Tiu traduko estas poste iom modifita de aliuloj, ne estas la origina traduk-versio de Leopold Elb.*

Ignoro, quid id sibi velit,  
Tristissimus cur sim,  
Antiqui aevi fabellam  
Cur saepe volverim.

Ne scias mi, kial mi estas  
Malgaja en la kor'.  
Antikva fabelo restas  
Por ĉiam en mia memor'.

Malgajon mi sentas en koro,  
sed kial tia tim'?'  
Legendo el pratempa foro  
Vagadas tra mia anim'.

Vesperascit et frigescit,  
Et Rhenus leniter it,  
Cacumen montis lucescit,  
Dum Phoebus occidit.

Vespero jam ekmalheliĝas,  
Fluadas la Rejn' en trankvil',  
La supro de l' monto lumigas  
En vespersuna bril'.

Jam fluas la Rejn' en malhelo,  
kaj malvarmetas l' aer'.  
Sed brilas la mont' en orbelo  
pro suna lum' de l' vesper'.

Sedet in summo montis  
Virgo pulcherrima,  
Auro nitet gemma frontis,  
Se pectit auricoma.

Belega knabino jen tronas  
Kun ora juvelar',  
La belan vizaĝon kronas  
Mirinde la ora harar'.

Jen supre kabino provokas  
per ora juvelar',  
kaj ŝia beleco allogas  
kaj ŝia ora harar'.

Aureolo pectine pectit,  
Carmen canens procul,  
Mirandum id habet modum  
Nec non virilem simul.

Ŝi uzas kombilon el oro  
Kaj dume kantas ŝi.  
Mirige tuŝas al koro  
Sorĉiga la melodi'.

Ŝi kombas ĝin, kantas sorĉige,  
sirene kantas ŝi  
per neimagebla, mirige  
potenca melodi'.

In cymba navitam mille  
Angores feri tenent,  
Non videt scopulos ille,  
Ocli non si sursum vident.

Kaj sopiregon eksentas  
Ŝipisto dum sia vetur';  
Rifaron li ne priatentas,  
Al monto rigardas li nur.

Ŝipiston en eta boato  
Turmentas koremoci'.  
Ne ĝenas lin rifo-kaskado,  
rigardas nur supren al ŝi!

Opinor undas devorare  
Nautam cum navicula,  
Effecit solo canendo  
Lurleia id dea.

Mi kredas, ke dronos finfine  
Ŝipisto kun sia boat',  
Kaj tion kaŭzis feine  
La Loreleja kantad'.

Ĝis tiras kun si al Rejn-fundo  
la ondoj lin kun boat'.  
Nun kuŝas li en la profundo  
pro Loreleja kantad'.

...

...

...

*Traduko de la Germana poemo  
“Die Lorelei” de HEINRICH HEI-  
NE (\*1797-12-13 – †1856-02-17)  
en la Latinan de N. N. 01.*

*Arg-2-179 (2010-02-11  
14:00:52)*

*Traduko de la Germana poemo  
“Die Lorelei” de HEINRICH HEI-  
NE (\*1797-12-13 – †1856-02-17)  
en Esperanton de LEOPOLD ELB  
(†1912-08.04).*

*Arg-2-71 (2005-02-03 19:06:30)*

*La traduko troviĝas sur paĝo 84  
de la lernolibro „Post la kurso“ de  
Wilhelm kaj Hans Wingen, eldo-  
nita de Ludwig Pickel en Nurem-  
bergo (Nürnberg), Germanio.*

*Traduko de la Germana poemo  
“Die Lorelei” de HEINRICH HEI-  
NE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en  
Esperanton de JOACHIM GIESSNER  
(\*1913-12-23 – †2003-11-25).*

*Arg-2-1115 (2010-09-15 12:51:51)*

*Tiu ĉi poem-traduko aperis en  
la kant-kolekto “Mia kantaro  
I”, eldonita de Josef Schif-  
fer (Wilstorfstr. 58, D-78050  
Villingen-Schwenningen, Germa-  
nio, tel. 0049(0)7721-58991; faks.  
0049(0)7721-508891, ret-adreso:  
Josef.Schiffer@t-online.de  
) , n-ro 30. Krome ĝi aperis en  
la informilo “Fervoja Esperan-  
tisto” de Germana Ferjojista  
Esperanto-Asocio, n-ro 3/2010,  
sur paĝo 3.*